# Díaz-Canel kunvenis kun turkaj entreprenistoj

Image not found or type unknown

**Díaz-Canel kunvenas kun turkaj entreprenistoj**

Istambulo, nov 26 (RHK) La kuba prezidento Miguel Díaz-Canel kunvenis en tiu ?i urbo kun turkaj entreprenistoj dum transira halto de sia flugo revene al la kariba insulo.

La kunsidon partoprenis entreprenistoj kunvokitaj de DEIK, organizo de entreprena diplomatio, kiu gvidas la ekonomiajn eksterajn rilatojn de la turka privata sektoro, la? precizigis la retejo de la kuba prezidanteco.

La celo de la kunsido estas impulsi ideojn kaj projektojn por kreskigi la rilatojn de la entreprenistoj de tiu e?roazia lando kun Kubo, komentis la insula ?tatestro.

En la kunsido la ministro pri ekstera komerco kaj fremdaj investoj, Rodrigo Malmierca, klarigis la trajtojn de la negoca dosiero kaj ?iaj potencialoj por la eksterlandaj investistoj.

Li klarigis ke la speciala evoluzono Mariel, en la okcidento de la insulo, havas la aspiron  fari?i la ?efa alloga spaco por la eksterlanda investado en Kubo.

Tiamaniere, la prezidento kuba finas sian laborviziton tra diversaj landoj, Al?erio, Rusio, Turkio kaj ?inio, kies celo estas solidigi la rilatojn politikajn, ekonomiajn kaj komercajn kun tiuj amikaj landoj.

Fonto: tvitero de la prezidanteco

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/306184-diaz-canel-kunvenis-kun-turkaj-entreprenistoj

**Radio Habana Cuba**